esperanto-lozere **esperanto-lozere@stelaro.lautre.net**

Saluton al ĉiuj
Ĉu vi jam konas la "galaksion" Framasoft? Temas pri ilaro por libere retumi. "Libere" signifas per malfermitaj programoj ("open source" kiel diras niaj bonfrancparolantaj samlingvanoj ;-))sen aliĝo al komercaj programoj, kiujn vi eble uzas pro ĉiaj kialoj, ĝenerale ĉar oni ne scipovas preterpasi ilin. Ja ekzistas rimedoj por krei dokumentojn aŭ transsendi ilin, serĉi informojn kaj interŝanĝi sen submeti sin al la leĝo de la "GAFAM" (Google-Amazon-Facebook-Apple-Microsoft), kies iloj spionas viajn gustojn kaj interesojn.

Nu, kiel fari? Unue simple vizitu tiun retejon:
https://framasoft.org/fr/
aŭ la kompleta prezento
https://framasoft.org/fr/full

Ĉion ili klarigas franclingve.
La programoj kaj informoj ekzistas kompreneble en multaj lingvoj, sed ne en Esperanto.
Mi aliĝis al la diskutlisto kaj proponis aldoni Esperantan version, kondiĉe ke la programistoj de Framasoft helpos nin. La projekto interesas ilin kaj tiucele ili donis al mi la trafajn ligilojn.

Dua kondiĉo koncernas nun vin, karajn E-istojn. Necesas brakoj, aŭ pli precize cerboj por esperantigi la diversajn programojn. Ju pli multe ni estos, des pli facile ni atingos la celon.
Kompreneble mi petos ankaŭ helpon de eksterlandaj samideanoj -jen avantaĝo de internacia lingvo!- sed komence mi invitas vin, la francojn, por la unuaj paŝoj. Baldaŭ videblas, ĉu la afero bone disvolviĝas. Tiukaze ni pligrandigos ĝin, sed ni ne vendu la ursfelon antaŭ ol pafi ĝin, ĉu ne?

Mi atendas respondojn, kiuj espereble ebligos nin pli larĝe vidigi Esperanton kaj certe plifaciligos la organizon de internaciaj eventoj.

Ne hezitu skribi al mi, ĉu vi havas demandojn…

Eble ĝis baldaŭ, amike
Alain